# ATEISMO

ESPERANTO

## Organo de ATEO

# ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO

Aŭtuno, 1988

Vol. 1, N-ro 1

Eldonita Trifoje Jare

# LA CELOJ
# DE ATEO

# ATEISTA TUTMONDA
# ESPERANTISTA-ORGANIZO

1. *Kunligi Esperantistajn ateistojn kaj liberpensulojn.*

2. *Disvastigi Esperanton inter ateistoj.*

3. *Defendi propran egalrajtecon kaj kontraŭi trudadon de religio en neŭtralajn Esperanto-grupojn.*

4. *Instigi ĉe neŭtralaj Esperanto-grupoj, ke oni egale varbu por Esperanto ĉe nereligiaj grupoj se oni varbas ĉe religiaj grupoj.*

5. *Akceli racian pensmanieron en Esperantujo kaj pri Esperanto mem kaj strebi altigi la intelektan kaj kulturan nivelon de Esperantujo.*

6. *Libere diskuti kaj analizi ateismajn movadojn, politikojn, kaj filozofiojn* **kaj** *ĉiajn rilatajn sociajn problemojn.*

7. *Malkateni la mensojn!*

# ENHAVO

**Raporto de la Estraro** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 2
Notu principe metodojn pri jarpago de abonkosto por 1989

**Feliĉa Sen Dio**, de Roland Schnell . . . . . . . . . . . . . . . . 4
Komentoj pri religio kaj eklezio en F.R.Germanio

**Religio, Ateismo kaj Esperanto**, de Eduardo Raus . . . . . . . 6
Religia historio en Rusio kaj influo de perestrojka pri religio

**Mia Dio**, de Robert Long, tradukita de Rejna de Jong . . . . 8
Nederalandaj legantoj defendas religion kontraŭ racia vereco

**Armagedona Teologio en Usono**, de John Massen . . . . . . . 10
Kreskanta fundamentista religio estas danĝero por Usono kaj la mondo

**Informo pri la Ateista Centro de Hindio**. . . . . . . . . . . . 14
"Ni Kresku Preter Religio", de Lavanam, direktoro

**La Materialismo Estas Liberiga kaj Feliĉigas**, de E. Diedrich . 16
Komento el Germanio D.R. pri materialismo kiel unu bazo de ateismo

**Letero de Humanismo**, de Andrea Salamon . . . . . . . . . . . 18
Izraela ateisto diskutas humanismon

**Letero al Redaktoro, kaj Demando al Legantoj** . . . . . . . 20
Grava demando al legantoj pri ebla valora servo al membroj de ATEO

★ ★ ★ ★ ★

# Raporto de la Estraro

## Resumo de la Kunveno ĉe Roterdamo

Nia unua kunveno je 1987-07-29 en hotela ĉambro ĉe la 72-a UK en Varsovio estis anoncita per mesaĝo metita sur la tabulo ĉe Kongresejo. Dek tri gehomoj ĉeestis el sep landoj: Usono--3, Polando--3, Sovetio--2, Bulgario--2, Francio--1, GDR--1, kaj Hungario--1. La kunveno, kvankam malgranda, estis tre sukcesa. La nomo, Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo, estis elektita kaj la organizo naskiĝis.

La kunveno je 1988-07-29 ĉe la 73-a UK en Roterdamo estis anoncita per la Kongresa programo kaj okazis en la Kongresejo. Pli ol 50 gehomoj ĉeestis; la diskuto estis vigla kaj 32 ankoraŭ ĉeestis je la fino, 30 minutoj post la tabelita tempo. Multaj diris ke ili valoras ATEO-n kaj la okazon renkontiĝi kun aliaj samideanoj; ili nelonge sentis sin izolaj.

La ĉefaj decidoj estis: (1) ATEO petos UEA-n fariĝi kiel "neneŭtrala faka organizo kunlaboranta kun UEA"; (2) la nomo de la revuo estos "ATEISMO" aŭ varianto (3/4 de 46 gehomoj); (3) la abonkosto estos $8.00 US aŭ ekvivalento en aliaj monoj (supoze du revuoj kaj du bultenoj jare); kaj (4) la nuna estraro daŭros ĝis la 74-a UK ĉe Brighton.

---

## Agoj kaj Decidoj de Estraro

La tri membroj kunvenis ĉe la Massen-a hejmo je aŭgusto 20-28. Ili decidis eldoni la revuon, ATEISMO, trifoje jare. Ĝi inkludos diversajn artikolojn, kaj tutan informon pri ATEO kio estis eldonita antaŭe en du Bultenoj. Tial, la sola eldonaĵo de ATEO estos ĉi tiu revuo. Ni poŝtekspedos la numerojn en januaro, mayo kaj septembro. Ni ne eblas poŝtekspedi ĉi tiun numeron pli frue ol octobro.

La UEA estraro konsilis ke vi traktu abonojn surbaze de kalendaraj jaroj. Preskaŭ ĉiuj movadaj revuoj faras tion, kaj tiel simpligas multe ilian laboron. Tial, la abonkosto de $8.00 US aŭ ekvivalento komencos kun la sekva numero, kaj ĉi tiu numero estas senkosta. Vol. 1 inkludos kvar numerojn; poste, ĉiu Vol. havos tri numerojn.

La estraro sendis al UEA: (1) Statuto, kaj (2) Kontrakto inter ATEO kaj UEA. Ni esperas ke ĉi tiuj dokumentoj estos aprobitaj, kaj ATEO estos "neneŭtrala fako kunlaboranta kun UEA" inkludita en 1989 Jarlibro.

**Metodoj pri Jarpago de Abonkosto por 1989**

**1. Pere de $8.00 US rekte al ATEO en Usono.** Se vi eblas, bonvolu pagi pere de ĉeko aŭ poŝtmandato, pagenda al "ATEO", kaj poŝtekspedas ĝin al: John B. Massen, 855 La Playa #458, San Francisco, CA 94121-3255, USA. **Se vi ne eblas pagi en tia maniero,** do pagu al UEA, se vi eblas.

**2. Pere de UEA.** ATEO aranĝas kun UEA por ĝia abonservo, por kiu ATEO pagos al UEA procenton de la abonkosto. **Se vi povas pagi pere de UEA, jen instrukcio: pagu rekte al UEA la sumon de 16 guldenoj aŭ ekvivalento en aliaj formoj, <u>pagebla al UEA</u>, por ATEO konto "ATEO-Y" por "ATEISMO".**

2.1 Se vi havas poŝtbankan konton, pagu prefere rekte en la nederlandan poŝtbankkonton de UEA, numero 378964. Se ne,...

2.2 Vi povas pagi per internacia poŝtmandato. Sendu poŝtmandaton al UEA, Niewe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam ... NE al banko aŭ poŝtbanko.

2.3 Ankaŭ eblas pagi rekte en la bankkonton de UEA ĉe Bank Mees & Hope, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam, numero 25.52.89.804.

2.4 Aliaj rimedoj estas, ekzemple:

2.41 Ĉekoj aŭ euroĉekoj (ne forgesu meti la numeron de via karto sur la dorsan flankon de eŭroĉeko).

2.42 Monbiletoj (ne nepre devas esti guldenaj, dolaraj aŭ forintaj - oni povas sendi per aliaj valutoj ekvivalentan sumon).

2.43 Internaciaj respondkuponoj. Valida internacia respondkupono valoras unu guldenon. Tia kupono validas nur se la stampo de la emisiinta poŝtoficejo estas sur la maldekstra parto; la dekstra parto estas por la akceptanta poŝtoficejo.

**Kiel ajn vi pagos, memoru ke, SE UEA simple ricevas monon - SEN iu mesaĝo, ĉu kun la pago aŭ ĉu per aparta letero - ili NE povos scii ke temas pri abono al "ATEO-Y" por "ATEISMO".**

**3. NE pagpovaj landoj.** Ni esperis ke ni povus aranĝi konvenan metodon ne post ĉi tiu dato, sed tio ne estis ebla. Ni esperos ke ni povos kompletigi aranĝon antaŭ ol la sekva numero de ATEISMO aperos.

---

**Artikoloj por Venonta Eldono, kaj Korespondo**

Ni esperas ke vi ŝatas la artikolojn en ĉi tiu unua numero de ATEISMO. Evidente, ni bezonas kaj deziras artikolojn kontribuitajn de niaj legantoj kaj abonantoj, pri diversaj temoj rilate al ateismo, religio, kaj ŝtata-eklezia interrilato en via lando. Ni deziras taŭgajn kartunojn kaj ŝercojn. Bonvolu sendi viajn kontribuojn baldau!

Ankau, ni bonvenigos viajn leterojn pri ATEISMO, kaj ni penos respondi senprokraste.

**Vidu eksteran dorsan kovrilon por la estrara adreso!**

## Feliĉa sen Dio, de Roland Schnell, F.R.Germanio

En la preĝejo "Sankta Kruco" in Berlin, oni eble baldaŭ povas ludi tablotenison, retpilkon aŭ eĉ ŝakon. Tio ne estas blasfemo de kontraŭkristanaj bolŝevikoj, kiuj jam sukcese transformis post la revolucio la preĝejojn al grenejoj. La kristana grupo, "sporto sub la kruco," prezentis ĉi tiun proponon kiel sia solvo de la grava problemo, ke la parohoj ne plu kapablas pagi la kostojn por siaj grandegaj preĝejoj.

En Berlin troviĝas proksimume 80 preĝejoj, kiuj estis konstruitaj en la tempo antaŭ la unua mondmilito kaj kiuj havas lokojn por centoj da dikredantoj. Sed nuntempe nur malmultaj personoj ĉeestas la regulajn diservojn. La dumvintra hejtado de la vastaj spacoj por manpleno da vizitantoj forrabas la monon de la parohoj, kiuj volonte akceptus alternativajn proponojn por la utiligoj de siaj preĝejoj.

La berlinaj protestantoj ankoraŭ ne aŭdacas kopii la ekzemplon de nederlando, kie preĝejoj transformiĝis al vendejoj, trinkejoj aŭ eĉ diskotekoj. Ili ankoraŭ strebas al deca utiligo, kiu povas esti koncertejo aŭ ekzpoziciejo. Ili ne kontraŭas la utiligon per aliaj kristanoj, ekzemple katolikoj, sed ili ankoraŭ ne akceptas, ke la preĝejoj iĝu moskeoj, kiujn la centmilo da turkoj loĝantaj en Berlin urĝe bezonus.

Por la riparo de la berlinaj preĝejoj estas bezonataj 100 milionoj da germanaj markoj, sed la parohoj nur kapablas elspezi kvin milionojn jare. Tial ili nun postulas subvencion de la ŝtato, kies devo estus, konservi la historiajn memoraĵojn.

La preĝejoj, kiuj nun estas tro grandaj kaj multekostaj por la ŝrumpanta paroho, respegulas la ŝanĝiĝantan rolon de la kristana religio en germanio. En enketo el la jaro 1981, nur 72% de la demanditaj personoj konfesis, ke ili estas dikredantoj. Religiajn kunvenojn regule partoprenis nur 21% kaj nur 7% estis aktivaj en iu religia organizo. Sep jaroj post tiu ĉi enketo la intereso pri religio ne kreskis.

### Forta influo de la eklezio al la socio

Tamen en okcidenta germanio, la du grandaj kristanaj eklezioj ĝis nun povis konservi sian influon en la plej gravaj kampoj de la socio. Ilia opinio influas la instruadon en la lernejoj, kie okazas deviga fakinstruo pri religio. En la federacia lando Bavario, la ministro pri kulturo ĉijare eĉ ordonis, ke la lernantoj preĝu antaŭ kaj post ĉiu lekciono. La eklezioj havas lokojn en la komisiono, kiu kontrolas la ŝtatajn radio- kaj televidostacioj, kaj tie regule estas prezentataj paroladoj de pastroj.

La politika partio, kiu nuntempe regas en Federacia Respubliko Germanio (FRG), per la adjektivo "kristandemokrata" en sia nomo klare montras, ke ĝi garantias la persiston de la okcidenta kultura tradicio, kiu dum preskaŭ 2000 jaroj estas decide influata de la kristana religio kaj ĝiaj organizoj. Pro tio la eklezio en germanio povas esti certa, ke la ŝtato ne ĉesos enkasigi por si la monon kun la salajra imposto.

Sed la nombro de tiuj kreskas, kiuj konscie rifuzas pagi la imposton por la eklezio, kies devigaj anoj ili estas, ĉar la gepatroj decidis porti la kelktagan bebon al la bapto. Por la plimulto sufiĉas, ke ili ne plu devas doni monon por afero, kiu ne plu interesas ilin. Eĉ se ili honorigas la sociajn servojn de la eklezio kaj la imitindan laboron en la tria mondo, ili ne volas subteni potencon, kiu

intencas modifi la socion ĉi tie laŭ sia reakcia ideologio.

Organizita batalo kontraŭ la religio kaj religiaj asociaj preskaŭ ne ekzistas. La kritiko ne estas malpermesata, sed estas malfacila atingi vastan publikon. La eklezioj, precipe la katolika, neniam hezitas laŭte protesti kontraŭ tio, kion ili rigardas kiel blazfemo. Se necese, ili postulas la helpon de polico kaj juĝistoj kontraŭ propagando, kiu ofendas la eklezion. Ofte afiŝoj, karikaturoj kaj desegnoj estas taksataj ofendaj.

**Kontraŭreligia propagando estas malofta**

La maldekstraj grupoj dum la lastaj jaroj hezitis ataki la religion. Socialdemokratoj ĉiam klopodas pruvi, ke ili ne estas ateistoj. La eksa kancliero Helmut Schmidt (helmut ŝmid) neniam kaŝis, ke li emas ludi la orgenon, la eventuala nova kandidato por tiu ĉi ofico, Johannes Rau (johanes raŭ) estas titolata "frato johano"; kaj alia influa socialdemokrato Erhard Eppler (erhard eplr) estas altranga funkciulo en la protestanta eklezio.

Eĉ la komunistoj, nur manpleno en germanio, hezitis pri kortraŭreligia propagando. En la pacmovado la kristanoj ludis gravan rolon, ĉar multaj kristanoj, grupoj, eĉ tutaj parohoj rekonis, ke armado ne estas taŭga vojo al paco. Kontraŭ la opinio de siaj episkopoj, kiuj tradicie ne hezitas beni armilojn, ili disvastigis informojn al aliaj kristanoj kaj partoprenis en manifestacioj.

Nur la liberpensuloj neniam kaŝis sian malŝaton pri religio. Sed ilia malmoda argumentado neniam atingis vastan publikon. La "junular-solenaĵo", kion ili ofertas kiel ateisma alternativo al la religia klerigado ("konfirmacio"), ludas neglektindan rolon. Sed la tendenco, rezigni pri dio, stimulas la intereson pri materiisamaj filizofiaj konceptoj. La liberpensuloj en Berlin tial komencis eldoni novan, moderne aspektan revuon. La nomo "Diesseits" (ĉi-flanke) estas programa: Pli kaj pli da homoj sentas la bezonon trovi filozofian kaj moralan bazon sen la neceso de alia transa mondo kaj nekomprenebla dio.

**Tribunaloj ne decidu pri filozofiaj disputoj**

Dikredantoj foje tendencas al la opinio, ke ateistoj estas ĉiukaze senmoralaj fiuloj, kies nura celo estas la kontentigo de siaj materiaj deziroj dum ĉi tiu vivo. Por ili, ĉiuj malbonaĵoj en la mondo ekzistas, ĉar multaj homoj rifuzas akcepti dion kaj la dian volon. Facile la ateistoj povas respondi per la sangoplena historio de la kristana mondo, dum kio okazis sennombraj krimoj "en la nomo de dio". Oni parolas pri 100 milionoj da homoj, kiuj mortis pro "sanktaj" militoj aŭ torturoj, kaj pro tio kelkaj ne hezitas titoli la katolikan eklezion "la plej grandan organizon de krimuloj en la mondo". Virino, kiu publikigis ĉi tiun konkludon en analizo pri la kristana historio, estis akuzata kaj kondamnita al 20 tagoj en prizono.

Certe ne estas dezirebla, se disputo pri filozofiaj demandoj, pri moralo, pri etiko estas limigita per la helpo de ŝtataj tribunaloj. Tamen estas konstatebla iu progreso, ĉar antau nelonge la Inkvizicio zorgis pli la unueco de la doktrino -- pruveblaj sciencaj faktoj, ĉu la formo de la terglobo, ĉu la deveno de la homa raso, kontraŭataj en la nomo de kristo. Kvankam la eklezioj estis devigataj modernigi siajn doktrinojn, multaj homoj strebas al pli raciaj klariĝoj de la procesoj en naturo kaj socio. Sen nova organiza strukturo, sen komuna doktrino, la nombro de paganaj en okcidenta germanio kreskas.

## Religioj, Ateismo kaj Esperanto, de Eduardo Raus, el Sovetio

**N.d.l.R.** Ĉi tio estas plejo de parolado eldirita al la 25-a Balta Esperanta Tendaro en Talino, 24-31 julio, 1988, kun 550 partoprenintoj. S-ro Raus estis partoprenanto en la unua kunveno de ATEO ĉe Varsovio.

### Religiaj grupoj en Esperantujo

Dum la Jubileo de Esperanto ĉe UK-72 en Varsovio kunvenis en la hotela ĉambro 11 esperantistoj-ateistoj (inter la preleganto) el diversaj landoj. Tiu iniciata grupo, gvidanta de S-ino Minerva Massen el Usono, fondis ATEO-n.

La partoprenintoj de la UK ĉiutage vidis la aktivecojn de multaj religiaj organizaĵoj: luteranoj, katolikoj, budistoj, bahaanoj, oomotoj, mormonoj, kvakeroj, kristanoj-protestantoj. Prezentitaj estis la Internacia biblia misio, spiritistoj kaj eble ankoraŭ iuj sektoj.

Bahaanoj kunvenadis ĉiutage. Amase estis disvastigata religia esperantlingva diversdirekta literaturo, speciale de katolikoj kaj bahaanoj.

Sed tute mankis iliaj oponantoj. Tio signifas, ke kongreson partoprenis sufiĉe multaj esperantistoj-ateistoj (do ĉiuj komunistoj estas aukaŭ ateistoj), sed ili tute ne videblis, ĉar estis ne organizitaj.

### Naturo de ateismo

La vorto *ateismo* konsistas el du grekaj vortoj: *A* - ero de neado; kaj *Theos* - dio. Neado de dio.

Ateismo kiel scienco okupiĝas pri la kaŭzoj de apero kaj ekzistado de religioj, pri ĝiaj lokoj en la socia vivo, pri la eblecoj liberiĝi de ĝi kaj enhavas filozofian, historian kaj natursciencan kritikon de la religio.

En la mondo ekzistas tre diversformaj ateismoj. La spontana ateismo aperadas surbaze de vivospertoj (ekzemplo pri la ŝaĥo Akbar).

Reganta en Sovetia scienca ateismo estas argumentita sistemo de antireligiaj konceptoj kaj ĝia bazo estas scienco kaj materiisma filozofio.

Ĉiam la ateismo esprimadis la interesojn de progresemaj fortoj.

La scienca ateismo pruvas, ke liberiĝi de religio eblas nur pere de likvido de ĝiaj sociaj kaŭzoj. Rezulte de la konstruado de la socialisma socio, Sovetunio estiĝis la unua lando, kie la plejmulto de la loĝantaro akceptis la ateisman mondkoncepton.

Sekve la ateismo okupiĝas pri esploro kaj kritiko de la religia ideologio, pri la renverso de la religiaj konceptoj, pri la apero de la vivo, pri dio, pri morto kaj senmorteco de la de la animo, pri la reviviĝo de mortintoj ktp, kontraŭstarigante al religian sciencan bildon.

La ateismo esploras la kondiĉojn de la apero kaj ekzisto de la fantaziaj religiaj konceptoj kaj iluzioj, kaj difinas la vojojn de la supero de la religiaj antaujuĝoj. Estas klare, ke tion povas fari nur scienco.

### Rusa historio

La ĉiopovan regadon de la religio demonstras la situacio en la antaurevolucia Rusio, kie la rusa-ortodoksa religio funkciis kiel la ŝtata eklezio, estis ĉiel subtenata de la reĝimo kaj caro. En la 1913 jaro en Rusio estis 17000 de inĝenieroj kaj 190,000 de religiuloj. Krom la rusa-ortodoksa ĉiuj aliaj religioj estis diskriminaciataj kaj persekutataj. La eklezio posedis grandegajn valoraĵojn. La plej granda religiulo estis la caro mem.

Post la socialisma revolucio, la eklezio estis en nia lando apartigita

de la ŝtato kaj la lernejo apartigita de la eklezio. La grandegaj posedaĵoj de la eklezio estis naciigitaj.

La rajto esti religia, aparteni al eklezio kaj plenumadi koncernajn ritojn, same la rajto okupiĝi pri ateismo apartenas en nia lando al la liberecoj de la konscienco kaj estas fiksitaj en la konstitucioj de Sovetunio kaj de Sovetiaj respublikoj. Esti religia kaj aparteni al iu eklezio estas unu el homaj rajtoj.

Post la revolucio la ateismo estiĝis en akra opozicio al la religio, ĝi estiĝis militema ateismo kaj kaŭzis neglekton de rajtoj de religiaj homoj kaj perfortojn.

**Religio sub perestroika**

Dum la lastaj jardekoj kaj precipe dum novigo-perestrojka la rilato al religio kaj eklezio profunde ŝanĝiĝis. La rilatoj mildiĝis, pietatiĝis. Inter ŝtato kaj eklezio ekestiĝis konsento. Aperis la kompreno, ke la religio ne estas kulpo de la homaro sed ĝia historia malfeliĉo.

Estiĝis la tasko ne lukti kontrau la religio kaj eklezio, sed altigi la konscion de homoj, helpi al ili liberiĝi de la religiaj konceptoj, levi la homan senton de propra respekto.

Nuntempe, ekzemple, la satiro kaj karikaturo en la kontraŭreligia propagando en nia lando ne estas jam praktike uzeblaj, ĉar tio ofendas la religiaj sentojn de homoj. Helpi al ofendito estas jam malfacile.

Dum centoj da jaroj la eklezio monopolis preskaŭ ĉiujn datrevenojn de naskiĝoj, geedziĝoj, entombigoj, kaj diversajn aliajn festotagojn, ankau ŝtatajn festojn.

Nun en nia kontraŭreligia agado radikiĝas civilaj festadoj, novaj ritoj. Homoj strebas levi siajn dignajn sentojn. Al ili helpas sovetiaj instancoj, kreiĝas kooperativoj por organizi diversajn ceremoniojn kaj festadojn. Nuntempe 3/4 da entombigoj okazas civile.

De la 1957 someraj tagoj de la gejunuloj en Estonio anstataŭas konfirmacion. Nun nur 10% de gejunuloj konfirmaciiĝas.

Ankaŭ ekleziuloj, por ne perdi siajn adeptojn kaj paroĥojn, ofte predikas preskaŭ civile, ne menciante Dion, Kriston kaj ĉielon.

Religiuloj kaj religiaj homoj en nia lando ne estas diskriminiciataj. Dum neniaj enketadoj kaj demandadoj, ankaŭ dum la popolnombradaj homoj ne estas pridemandataj pri la apartenо al iu religio aŭ eklezio.

**Festo de mil-jaroj de Rusa kristanismo**

La kunlaboro de la eklezio kaj ŝtato karakterizas la ŝanĝintan situacion de la eklezio en nia lando, precipe dum la novigo-perestrojka ekregas la novan pensmanieron. Tion demonstris jam multaj lastaj eventoj kaj plej elokvente la celebrado de la 1000-jariĝo de akcepto de kristanismo en Rusio. La celebrado okazis alte ŝtatnivele. Gin partoprenis la plej altrangaj religiuloj de preskaŭ ĉiuj eklezioj el pli ol 100 landoj. Tiun eventon alte taksis ankaŭ U.N. kiel eventon de la tutmonda kulturo.

La patriarko de Moskvo kaj tuta Rusio, Pimen, diris interalie dum la ŝtata akcepto por la partoprenantoj de la celebrado: "La restarigo de la leninaj normoj en rilatoj inter eklezio kaj ŝtato inspiras nian eklezion por la partopreno en la progresema procezo de perestrojka en nia lando." Pimen deklaris, ke la rusa ortodoksa eklezio faros ĉion per sia packrea agado proksimigi la revon de la homaro-liberigon de la tero de la atoma armilaro ĝis la komenco de la 3-a miljaro de naskiĝo de Kristo.

La reprezentanto de Vatikano, ĝia ĉefministro, kardinalo Kazaroli, esprimis grandan ĝojon pri la altni-

vela celebrado, kaj substrekis, ke antaŭnelonge estus tia celebrado neebla.

Ateistoj, pro la timo de ofendigo, silentas kaj lasas la religianojn libere esprime siajn frenezaĵojn.

Dum la 3-a UK de Esperanto fondiĝis la internacia Societo Esperantista Liberpensula, nun ekzistas nur la liberpensula frakcio de SAT.

Tre vaste uzis Esperanto en sia agado la Unio de Militemaj Ateistoj en Sovetio en 20-30 jaroj.

Nun ATEO. Ĝiaj celoj estas: [Bonvolu vidi la celojn sur la interna antaŭa kovrilo de ĉi tiu revuo. Ne bezonas ripeti ilin ĉi tie.]

Ĉu necesas en nuntempa situacio en Sovetio revivigi ian esperantistan-ateistan agadon? Miaopinie tio estas reala nur ĉe apartaj lokaj organizaĵoj. Bonvolu doni viajn opiniojn.

## Mia Dio, de Robert Long, en *Algemeen Dagblad* (Ĝenerala Ĵurnalo), 01-02-1988)
Tradukita de Rejna de Jong, Nederlando

"Ĉu do vi kredas je tute nenio?"

Se antaŭe mi provis honeste respondi, plejofte sekvis akraj, longdaŭraj diskutoj el kiuj rezultis nekompreno kaj la sento ke vi diskreditigas la vidpunkton unu de la alia. La rezulto estis nulo.

Se nuntempe oni faras al mi la saman demandon, mi plejofte diras: "Ne." Tamen ĉi tiu respondo estigas miskomprenojn rilate al mi. Certe nun kiam EO (Evangelia Radioasocio) opinias, ke ĝi rajtas kulpigi min pri aferoj kiel blasfemo kaj fiaĵoj, ŝajnas al mi senchave iom klarigi kelkajn punktojn.

**Mi sendube ja kredas**

Eĉ pli, mi havas tre firman ligon kun Dio. Aŭ por diri tion pli klare: kun mia Dio, kiu kontraŭe al siaj kolegoj - kaj li havas multajn, samkiel Sankta Nikolao komence de decembro ĉiam havas tutan grupon da help-Sanktaj Nikolaoj - estas tre alirebla. Vi preskaŭ povus diri homa.

Nenio homa estas al li fremda. Li ja ne havas sidejon en la ĉielo aŭ sin kaŝas malantaŭ episkopo aŭ inter misteraj simboloj, ne, Li loĝas en mi. Kaj ne en mia koro, nek en mia mieno, hepato aŭ dika intesto, sed en mia cerbo, en mia sango, en mia sento, en mia konscienco kaj en miaj erotogenaj partoj por mencii kelkajn lokojn. Al Li ankaŭ ne plaĉas Diservoj, senfinaj preĝoj kaj prapekaj. Iam Li diris al mi: "Vi lasu la diservon. Sufiĉas al mi vidi ke vi faras vian eblon, eĉ se tio malsukcesas. Mi ne bezonas viajn preĝojn, ĉar mi scias kion vi sentas kiam vi ĝuas, kiam vi estas feliĉa aŭ afliktita. Vian dankon mi ne bezonas, ĉar ĝin mi jam sentas antaŭ ol vi mem konscias ĝin. Petegi ne helpas, vi mem faru ĉion per tio kio estas en vi, do inkluzive de Mi."

Kiam mi singarde demandis al Li, kiu fakte estas la vera Dio, li ridegis kaj diris: "Tiuj kristanaj uloj ĉarpentis por mi belan kaĝon kaj jam dum jarcentoj ili pli kaj pli beligas ĝin; specialaj fenestroj, apartaj koloroj, pezaj pordoj, pompaj formoj. Ili erare pensas ke mi estas en ĝi kaj obeeme elmanĝas la ujojn kiujn ili metas antaŭ mi. Sed mi ne havas daŭran loĝ- aŭ restadlokon. Mi estas vagulo. Mi aperas ĉie kaj nenie se tiel diri."

"Nu", mi diris singarde, "se mi publikigus ion tian, oni dirus, ke mi blasfemas."

"Lasu ilin babilaĉi, mia infano", Li subridis. "Komprenu do, ke iom da Dio ne estas ofendebla."

"Sed EO . .", mi ankorau provis. "Tia speco", Li interrompis min, "ekzistas jam dum jarcentoj kaj ĉiam ekzistos. Se iu diras ion kio al ili ne plaĉas: ek, sur la brulŝtiparon. Se iu ne pensas kiel ili: hop, kvaronumu la viron. Se iu asertas ke la tero ne estas plata, sed ronda: en la karceron la fripono."

"Sed", mi daŭrigis la demandojn, "nun ili volas malpermesi al homoj kiuj tute senkulpas spekti la skeĉadon por viroj en Calgary je la 18a kaj 19a de februaro. Ĉar NOS (Nederlanda Radioasocia Fondaĵo) aŭdigis kanton de mia longluda disko. Estas ja neniaj rilatoj inter tiuj aferoj, ĉu?"

"Por ili ja estas. Ilia moto: kiu ne volas aŭdi, ankaŭ ne rajtas spekti. Ili rigidas pro certecoj."

Li ridetis kaj flustris: "Vi restu dubanto. Ĉion tagon vi elmetu al diskutado vian kredon je mi. Se nur vi neniam metu min en kaĝon, ĉar tie eĉ dioj forvelkas."

**Reagaj ensenditaj leteroj**

1. "La artikoleto "Mia Dio" de Robert Long klare montras, ke Robert ja havas dion. Robert havas sian dion, dio al kiu ĉio plaĉas, ia naivulo, laŭ kiu Robert povas agi lauplaĉe. (Kiel konvene!) Unu afero estas klara: ĉi tiu ne estas la Dio pri kiu temas en la Biblio. Vi ne volas juĝi, sed se Robert havus rilatojn kun la Vivanta Dio kaj spertus Lin, li pro timo antaŭ kaj amo al Li ne kuraĝis skribi ke Dio diris: "Lasu ilin babilaĉi", aŭ "ili rigidas pro certecoj". Robert kun via dio vi ne povas havi certecojn, sed kun la vera Vivanta Dio vi havas unu grandan certecon kaj tio estas Dio."

2. "Mi min demandas kiom longe la redakcio ankoraŭ permesos, ke multajn legantojn de la ĵurnalo ofendas la artikoloj de Robert Long. La kolumno "Mia Dio" sendube ĉagrenis multajn legantojn pri ilia plej profunda konvinko. La redakcio eĉ atentigis pri ĝi sur la frontpaĝo, kio pli malbonigis la aferon. Subnivele!"

3. "La 'kredkonfeso' de Robert Long en AD neniel rilatas al EO. Ĝi estas nura granda moko pri Dio mem. Robert Long unue ekhavu iom da scio pri la Biblio. Nur poste li povus paroli kaj skribi ĉi-terene bone konante la aferon. Ĝis nun li nur ofendis Dion kaj la kristanismon. Kiel pliklarigo: Mi ne estas adepto de EO."

4. "En la lasta Honeymoon-show de Ron aperis Robert Long. Li tre bele kantis kaj la orkestro estis bona. Sed R.L. kantis kun plilaŭtigo de la voĉo: 'Kie loĝas amo benas la Eternulo.' Tamen la amo, kion li celis, rilatas nur al enamiĝo kaj sekso anstataŭ al ĝenerala amo. Tio estas amo al la proksimulo, eĉ amo al viaj malamikoj."

5. "Kian ofendan artikolon skribis R.L. en via ĵurnalo de la 1a de februaro. Tia malpurigo do la proksimulo impresas ne tre altnivela. Ni nepre ne misuzu nian liberon de opiniesprimo, buĉante unu la alian per vortoj! Esti kritikema estas bone, sed kial ne ekz. per la 'armilo' de la humuro? Tio ofte hele prilumas situaciojn sen krudeco. Eble S-ro Long volus klopodi esti bona ekzemplo pri tio, montrante respekton por alies konvinko kaj vivmaniero."

[N.D.L.R.: Estis kvin aliaj leteroj eldonitaj antaŭ ol la redakcio fermis la diskuton. Ne estas space por ili ĉi tie.]

## Armagedona Teologio en Usono

[**Noto de JM.** Unu vizio de la Kristana Dio emfazas Sian amon kaj kompaton, kaj Sian antaŭenigon de paco kaj justeco. Armagedona teologio (poste "A.T."), tamen, rigardas Lin tre malsimile: Dio de venĝo kaj malamo, kiu antaŭ-dekretis per Bibliaj profetaĵoj la tutan detruon de nia planedo, escepte de renaskiĝaj Kristanoj kiuj riverencis antaŭ Li. Ci tiuj du interpretoj de la Biblio estas sinnuligaj kaj verŝajne ne gravaj, sed kiel nur grandegaj ekzemploj de Biblia kontraŭdiro, kiu pruvas ĝian senvaloron historie, profete, kaj moralgvide. Bedaŭrinde, A.T. kreskas kiel malinga forto, unue kiu estus komprenata de pensemaj raciaj popoloj, kaj tiam kontraustarita ĉie. La jena teksto estas el *Profetaĵo kaj Politiko* (*Prophecy and Politics*), de Grace Halsell, Lawrence Hill & Co., Usono; 1986, pp. 1-50. Resumo de John Massen, tradukita de Minerva Massen.]

**Bazo en Juda-Kristana Biblio**

A.T. profetas ke ni jam rapide kaj fatale proksimiĝas al tuta ekstermo per Armagedono, kiu okazos ĉe Megiddo apud Haifa. La Biblio mencias "Armagedono" nur unufoje, en Apokalipso 16:16, kiel loko; tamen A.T. faras ĝin kiel evento -- la loko de la fina batalo. Apokalipso 16 diras ke la rivero Eŭfrato sekiĝos, permesonte la reĝojn de la Oriento movigi la plej grandan armeon historie de la mondo al Megiddo. La "besto" de Johano en Apokalipso signifas ke estos potenca unuiĝo de dek nacioj de Eŭropo--la Eŭropa Ekonomia Komunumo--kiu okazos dum la finaj tagoj. Jeĥezkelo ĉapitroj 38-39 profetis antau 2600 jaroj pri lando norde de Palestino, nomita Rosh, kiu klare signifas Rusio; kun du urboj, Meshech kaj Tubal--la nomoj rimarkinde simile al Moskvo kaj Tubolsk, du ĉefurboj de nuntempa Rusio. [Malgranda urbo de Tobolsk situas nord-okcidente de Omsk - N.d.l.R.] Jeĥezkelo 38:12 klarigas la celon de la Rusa invado--posedi la oleon.

Zeĥarjo kaj Apokalipso profetas ke la fortoj de la nacioj de la tuta tero sub la Antikristo luktos kontrau Reĝo Jesuo kaj liaj gloriaj sanktoj. Jeĥezkelo evidente pensis pri taktikaj nukleaj armiloj kiam li skribis ĉapitrojn 38 kaj 39. Jesuo, kiel la Superega Komandanto faros la unuan frapon per nova nuklea armilo: Zeĥarjo 14:12 diras ke

"ilia karno estos forkonsumita dum ili piedstaras kaj iliaj okuloj estos forkonsumitaj en iliajn truojn, kaj ilia lango estos forkonsumita en ilian buŝon." Kristo, per la plej sanga batalo de historio, detruos milionojn kaj forigos la Antikriston.

Zeĥarjo 13:8-9 diras ke du triono de judoj vivantaj ĉi tie estos mortigitaj (nau milionoj de la 13.5 milionaj judoj nuntempe en la mondo). Sango verŝos kiel el vina premilo; lau 200 mejloj la sango atingos la bridojn de la ĉevaloj. Dio mortigos plejmulton da popolo de la mondo kaj detruos plejmulton da nia civilizio; principe por Sia prapopolo, la judoj. Li elpensis sep jarojn de Tribunaleca periodo, ĉefe por purigi la judojn, Siajn favorajn inter tutpopoloj de la mondo, ĉar Li deziras ke ili riverencas antaŭ Lia sola filo, Jesuo.

Dio estas suverena, superega en povo; kion Li decidas, tio okazos. La homa menso ne povas koncepti pri tia malhumaneco de homo kontraŭ homo, ankoraŭ Dio permesos homnaturon plene elmontri sin tiutage. Neniu homo aŭ nacio povas eviti tion kion Li volas okazi. Tuta historio iusence estis antau-determenita de Dio. Ĉio kion ni legas okazante en la mondo nuntempe indikas klare ke ĉi tiu batalo okazos tre baldaŭ. Kristo revenos al tero por restarigi la registaron de Dio kaj kunporti mondpacon, regante la mondon de Sia sidloko en Jerusalemo.

En I Tesalonikanoj 4:16-17: la Sinjoro malsupreniras el Ĉielo; kaj la mortintoj en Kristo altiĝos unue; tiam, tiuj, kiuj vivas kaj restas, estos kaptitaj (A.T. nomas ĝin kiel "ravita") kune kun ili en la nubojn por renkonti la Sinjoron en la aero. Renaskiĝita Kristano, dum la veturigo de sia aŭtomobilo kun nekredanta amiko, kiam la Ravigo okazos, estos superlevigita en la aeron el la aŭto, dum la aŭto daŭras hazarde kaj la amiko estos mortigita per akcidento. La supervivantoj ne havas memorojn pri la agonio de amikoj kaj amatoj en infero. Jesuo savas homaron el tuta estingo per konservo de fidela restaĵo. Tiuj judoj, kiuj ne buĉiĝis, konvertos al Kristanismo kaj predikos la evangelion de Kristo.

> [**Noto de JM.** Tiu Dio - kiu detruos ĉion sur ĉi tiu tero kion li supoze kreis, escepte tiuj kiuj deklaras sian tutan kredon kaj fidon en Li - estas monstro. Tia Dio estas tute malinda de kredo de homoj kiuj supoze estis kreitaj de Li. Homoj - kiuj fidas tian Dion kaj kiuj kredas ke ili estis kreitaj en la figuro de Dio - estas intelektaj kaj moralaj monstroj simile kiel sia Dio. Armagedonismo estas ne nur alterna, nenecesa kaj

**[Armagedona Teologio en Usono--daŭrigita]**

erara interpreto de "Sankta Skribo", sed ĝi estas grandega trompo fabrikita el disigitaj kaj malrilataj versoj.]

**Historio kaj politiko**

Armagedonismo pligrandiĝis en Usono por pli ol jarcento. Estis granda kresko pro la lastatempe ekgrandeco de evangeliaj fundamentismaj predikistoj, plejmulto de kiuj estas Armagedonistoj, aperante ĉe miloj de TV kaj radiaj dissendejoj. Plimulto de 100,000 studentoj en Usonaj bibliaj lernejoj poste foriros instrui Armagedonismon. Lastatempaj opiniaj enketoj indikis pliiĝantan grandan nombron da Usonanoj sentas ke ni estas kondamnitaj kaj ni mem detruos la planedon. Se la Yankelovich enketo en 1984 estus korekta, tiam iuj 85 milionoj de Usonanoj pensas ke nuklea milito estas neevitebla. La Neilsen ekspertizo kiu aperis en oktobro, 1985, montris ke 61 milionoj de Usonanoj (40 procento de tutvidantoj) konstante vidas kaj aŭskultas predikistojn kiuj diras ke ni ne povas fari nenion por ke evitu nuklean militon en nia vivdaŭro.

Nacie la eminentaj TV predikistoj estas Armagedonistoj.

▸ Jerry Falwell finis predikon kiu pentris teruran finon de la mondo, per granda rideto, dirinte: "Ho, estas mirinde estante Kristano! Ni havas mirindan estontecon antaŭen."

▸ Jim Robison, elektita de Reagan por la komenca preĝo ĉe la 1984 Respublika Nacia Kunveno, diris, "Ne estu nenia paco ĝis Jesuo venos. Iu ajn predikado de paco antaŭ ol ĉi tiu reveno estas herezo; estas kontraŭ la vorto de Dio; estas Antikristo."

▸ Jimmy Swaggart diris: "Ni ne farus iuj ajn kontraktojn kun Sovetunio . . Mi ne planas iri tra la infero kiu venos. . Mi feliĉas pri tio. Li venos denove. . Mi ne zorgas pri kiu ĝi [Armagedono] ĉagrenas. Ĝi travibrigas mian animon."

▸ Pat Robertson, la 9-an de junio, 1982, je tri tagoj post ol Israelo invadis Libanon, ripetis sian pli fruan profetaĵon ke ĝis la aŭtuno de 1982 estos juĝo al la mondo, precipe al Sovetunio; li reassertis ke baldaŭ io okazus por plenumi Jeĥezkelo-n, ke Usono estas en la Jehezkela verso, kaj ni staras atendante la neeviteblan finan batalon.

Pat Robertson estis timinda kandidato por Prezidento en 1988 [kaj estos denove en 1992--N.de JM]; eble li povus komenci nuklean militon kontraŭ Sovetunio pro siaj religiaj kredoj, tiel pruvante memplenumon de Biblia profetaĵo. Sed ni nun havas Prezidento kiu

kredas pri Armegedona teologio kaj kiu povus agi por tio.

En 1971, Gubernatoro Ronald Reagan, vespermanĝinte kun Ŝtat-senatano James Mills, konfidis sian kredon ke ĉio tiutempe iris laŭ intenco por plenumi la profetaĵon de Jeĥezkelo: Gog, nacio norde, kondukos ĉiujn aliajn povojn de mallumo kontraŭ Israelo. Reagan diris al Mills ke tiu profetaĵo estis sensa de kiam Rusio iĝis komunista kaj ateista, kaj kontraŭis Dion, tiel nun Rusio similas perfekte al la priskribo de Gog. Kiam Libio fariĝis komunista en 1971, Gubernatoro Reagan vidis tion kiel signo ke la tago de Armagedono estas ne malproksima; Prezidento Reagan malamas Libion ĉar li vidas Libion kiel unu de profetitaj malamikoj de Israelo kaj tiel malamiko de Dio. Reagan, kiel Gubernatoro kaj Prezidento faris multajn bone dokumentajn asertojn kiuj konfirmis sian kredon en Armagedono. Falwell konfirmis al aliaj ke Reagan kredas tion. Reagan invitis Falwell-n en 1983 ĉeesti la Koncilon de Nacia Sekureco por instrukcioj kaj diskutoj kun la plej gravaj instancoj de Usono pri planoj por nuklea milito kontraŭ Sovetio.

Senatano Mills, skribinte en la Gazeto de San Diego, aŭguston 1985, pri tiu 1971 konversacio, rimarkis ke pligravaj politikoj de Prezidento Reagan tute konformas al lia Armagedonismo: (1) rilate al Sovetunio kiel la "malbona imperio"; (2) ege altiĝo de milita elspezo, ĉar Armagedono ne povas okazi en malarmiga mondo; iu ajn, kiu kredas ke Armagedono okazos, ne povas atendi ke malarmigado okazos; malarmigo estas mala al la plano de Dio kiel laŭ Sia vorto; (3) la nacia kaj mona politiko de la Prezidento estas harmoniaj al siaj opinioj de Bibliaj profetaĵoj; ne gravas maltrankviliĝi pri la nacia ŝuldo se Dio baldaŭ ĉesigos la tutan mondon; kaj (4) James Watt, Sekretario de la Internaj Aferoj povus scii nenian kialon por konservi niajn naturprovizojn por estontaj generacioj kiam ĉi tiu generacio povus esti la fina.

> [**Noto de JM.** La establo de la milita kaj alilanda politiko de la plej granda nacio kaj ĝia mezorienta aliancano, per la kredo de biblia profetaĵo kiu antaŭdiras kaj kontrolas eventojn okazitajn miloj de jaroj poste, estas la fina frenezeco de religia kredo kaj registara politiko. Tia politiko ne estas certa <u>nun</u> en Usono, sed estos ankoraŭ ebla kaj vera danĝera por la mondo.]

## Informo pri la Ateista Centro de Hindio

Letero el Lavanam, direktoro de Ateista Centro en Vijayawada, Hindio

1988-06-24
Kara amikino Minerva Massen:

Multajn dankojn pro via letero de 5-a de junio kaj pro la Bulteno de ATEO. Gratulojn pro ĉi tiu entrepreno. Kvankam mi ne scipovas Esperanton, mi favoras la lingvon kaj antaŭenigas ĝin. Mi vizitis la oficejon de UEA en Roterdamo trifoje kiam mi restis tie in Nederlando. Mi ankaŭ konas Profesoro Tonkin, la Prezidanto de UEA. Mi konstatas por ke antaŭenigu tutmondan homarismon, Ateistoj interesiĝu en la disvastigo de Esperanto kaj ankaŭ skribu Esperante pri ateismo. Tial mi gratulas vin pri via intenco traduki artikolojn el mia revuo *La Ateisto*, kaj el aliaj eldonaĵoj de la Ateista Centro Esperante kaj aperigi ilin en via revuo. Do mi donas al vi permeson traduki iu ajn artikolojn kaj eldoni ilin en viaj eldonaĵoj......

Feliĉe mi informas vin ke la Ateista Centro en Hindio havos 50 jarojn en 1990 kaj ni planos celebri la Oran Jubileon en februaro 1990 ĉe Vijayawada. Mi donas al vi koran inviton viziti nin kaj partopreni en la Ora Jubileo.....

Via en homaneco,
Lavanam

Sekve, la jena artikolo el *La Ateisto*, la Hindia revuo de Lavanam, junio-julio 1987.

## Ni Kresku Preter Religio

Se la spirito de religia toleremo eblus kaj aktiviĝus, ĉiuj religioj establus humanismon. Ĉar ĉiu religio indulgas sin per mem-glorado kaj difinas ĝian dion kiel la supera kaj fina profeto, ne ebliĝas atingi religian toleremon. Tiuj, kiuj kredas en religio, klopodas miskonduki homojn, ĉar ili interpretas sekularismon interrilate al religia tolero kiu fariĝas neebla transporti en agon. Lavanam konsideris tian interpreton kiel insulto al homa inteligenteco.

**Politika Solvo Neeblas**

La religiaj decidoj kaj problemoj, kiuj alfrontas la nacion, postulas socian, ne politikan solvon. La politika solvo al la religia problemo estas finfine la divido de la lando. Tiel tia solvo kreis Pakistanon el la Islamanaj plimultaj provincoj, la 14-an de augusto, 1947. Tamen eĉ post la disigo de la lando, la problemoj kiuj frontis la Islamanojn ne estis solvitaj. Ĉiujare ie Hinduaj-Islamanaj tumultoj okazas. Eĉ post la fondo de Pakistano, multaj Islamanoj restis en Hindio. Nuntempe estas 100 milionoj de Islamanoj en Hindio, kiu superas la loĝantaron de Pakistano. Hindio havas la duan grandan plimulton da Islamanoj en la mondo, kompare al Indonesio kiel la unua. Lavanam emfazis la punkton ke ne estas politika solvo al la religia problemo.

Aliflanke religio ne povis atingi unuecon. Orienta Pakistano, kiu formis parton de Pakistano, kreita pro la bazo de Islamanaj plimultaj provincoj, t.e. religio, malfederaciiĝis el Pakistano pro lingvo kaj deklaris sin kiel Bangla Desh. Lavanam denove emfazis la punkton ke religio nek povis iniciati toleremon nek konservi unuecon.

Post la divido de la lando kiam Pakistano deklaris sin kiel Islama respubliko, Hindio, kiu estas aglomeraĵo de multaj religioj, fariĝis kiel sekulara ŝtato. Tamen la politika estraro tiutage kaj la Hinduaj intelek-

tuloj ne sufiĉe kuraĝis starigi sekularan registaron kiu superas religion. Do, sekularismo restas nur en nomo. Tiutempe, Islamanoj en Hindio estis pretaj akcepti tian sekularismon, ĉar ili timis ke ili perforte devus transmigri al Pakistano se ili malkaŝe deklaris sin kiel religiuloj. Ĉar la politikuloj ne havis la kuraĝon establi sekularan registaron superante religion, ili interpretis sekularismon en limigita sfero kiel religia toleremo. Sekve, ĉiuj religiistoj interpretis ĝin laŭ sia propra religio kaj gajnis forton el ĝi. Tial humanismo kiu superas religion ne povis esti starigita. Tio pruvis tre bonega al ĉiuj minoritataj religioj, precipe al Islamanoj por gajni preferan traktadon, dum alkroĉiĝo al siaj religiaj tradicioj. Nuntempe ni suferas la akrajn rezultojn de la malnovaj politikoj. Lavanam diris ke ni devas fronti ne nur Islaman fundamentismon sed ankaŭ Sikh-an fundamentismon.

**Permesu la Plimulton Sekvi Sekularismon**

Ni heredis seriozajn problemojn, pro la manko de kuraĝo flanke de la malnova politika estraro kiu, aŭ pro la timeco aŭ Hindua religia vidpunkto, ne kreis la konvenan etoson, kiam la kondiĉoj favoris, por la disvolviĝo de sekularismo kiu superas religion. Tial ni trovas grandan malfacilaĵon evoluigi sekularismon bazitan vaste je humanismo, kaj ni alfrontas grandegajn problemojn. Lavanam pledis ke se Hinduoj, kiuj apartenas al la plimulta religio unue akceptus sekularan vidpunkton, tiam la minoritataj religiistoj akceptus ĝin.

Sekularismo kiu estas humanista spirite kaj tranĉas sin el religiaj ligiloj estas la sola solvo al la problemoj frontante la landon kaj komunumajn tumultojn. Religio ne povas efektivigi humanismon. Lavanam emfazis la vidpunkton ke nur kiam humanismo superas religion, ĝi prosperas.

**Religio kunportas katastrofon**

Lavanam demandis kiel ateistoj kaj raciistoj, kiuj ne povus akcepti religion, estus traktitaj se sekularismo signifas nuran religian toleremon. Tial sekularismo ne signifas religian toleremon. Sekularismo signifas egalan respekton al ĉiuj individuoj sen iu ajn referenco al iliaj religiaj au ne-religiaj kredoj. Ni kapablus subigi mallarĝajn religiajn limigojn kaj vidu homon kiel homo, diris Lavanam.

Guste kiel nukleaj armiloj estas danĝero al mondpaco, religia perspektivo provas detruon al la unueco de Hindio. Tial Lavanam admonis ke niaj politikanoj disĵetus religian perspektivon, praktiki sekularan vidpunkton, kaj montri ekzemplon al la popolo. Li esprimis la opinion ke malkaŝe kaj vaste la disvastiĝo de ateismo helpus kulturi la sekularan vidon.

# La Materialismo Estas Liberiga kaj Feliĉigas

de Ernst Diedrich, Germanio D.R.

Materialismo estas scienca pensomaniero, sekve ĝi ĉiam estis kaj estas grandanima, jes, kontraŭe al krista, juda, islama kaj aliaj religioj. Ateistoj neniam kaj nenie persekutis, murdis religianojn. La intrigaj akuzoj al Sovetio, al Ĉinio, al GDR pri kontraŭreligiaj persekutoj estas venenaj mensogoj de fanatikuloj.

Ekzistas surtere ĉirkaŭ 3000 religioj; ĉiu postulas kredon laŭ sia maniero kaj volas moleste konverti aliajn homojn. Sanga spuro en historio postlasis, ekzemple, la religio de katolikismo. Aŭ - kiom da homoj la judoj murdadis laŭ la ordono de sia Dio! (pruvo estas la legado de la Biblio.)

Ni ne daŭrigu! - ĉar oni povus verki diversajn dikajn librojn pri la krimaj, sangasoifaj fiagoj de iuj religiuloj . . ĝis hodiaŭ!!

**Charles Darwin**

Je la fino de septembro 1881 en la Down-House de Darwin vizitante alvenis la prezidanto de la internacia Liberpensula Federacio: Ludwig Buchner, kaj kun li Edward Aveling (la bofilo de Marx). Oni konversaciis pri la ateismo de la liberpensuloj, kaj Darwin admonis ridetante: "Kial vi estas tiel atakemaj? Ĉu tio utilus, se vi altrudus la novajn ideojn al la amaso de la homaro? Ĉio estas avantaĝa por bone edukitaj, kleraj kaj pensantaj homoj? Ĉu la amaso jam estas sufiĉe matura?"

(Tio similas-male-al la potencaj papoj en Vatikano, kiuj mem ne kredis, sed ili igis bruligi kaj mortigi ĉiujn siajn subulojn, kiuj ĉesis kredi laŭ la linio desirata de Vatikano.)

Charles Darwin havis pian edzinon, Emma Wedgwood, kaj tial li ĉiam penis, per siaj sciencaj esploroj ne igi al ŝi animajn dolorojn. Male ŝi - post lia morto (kun filo Francis) - ŝi trompe forigis leterojn kaj alineojn el la edzaj postlasitaĵoj, kiuj estus "tro krudaĉaj" = tro malpiaj. Per religia fanatikeco ŝi estis blinda al la fakto: La Darwinismo jam sendependigis sin de sia kreinto kaj fariĝis internacia, aplikata en multaj sciencaj branĉoj, ekzemple, en agrikulturo, en astronomio, en lingva sciencо kaj aliaj. La "plej danĝera branĉo" estis la Dialektika kaj Historia Materialismo, kiun Darwin ne naskis, sed li nevole multe aldonis al la scienco de la socialista internacio ( = ties filozofiaj fontoj ja venis de Hegel kaj Feuerbach).

**Kredantoj ne estas niaj malamikoj**

La liberpensado apartenas al la tuta nuna revolucia mondomovado, do, al la liberigado de la homa animo. Tamen - neniam ni forgesu, ke la kredantoj ne estas niaj malamikoj! Nur kun ili ni venkos la mondmiliton III kaj la pereon de ĉiu surtera vivo.

Se iuj avinoj aŭ aliaj personoj bezonas nepre sian Dion, siajn preĝojn kaj diservojn, ni ne prenu de tiuj ilian "feliĉon", kiu kutime estas kaŭzita per la timo pro morto, sekve per nekompreno kaj nescio.

Nia sinteno al religio estu tia, pri kio Karl Liebknecht parolis en la "Reichstag" dum subpremado per la Bismarka estraro kontraŭ la katalolikoj. Karl Liebnecht postulis religian liberecon, sed samtempe li ankaŭ postulis energie liberecon al la materialismo, al la socialdemokrata internacio.

Ni estas liberpensuloj, kaj ni ne estas intrigantaj, mensogantaj religifanatikuloj. Nia celo estas, savi la homaron el la fimanoj de la despotaj, militemaj monopoloj kaj fari la vivon

de ĉiu homo tiel longan, kaj feliĉan kiel eblas. Nia planedo estu loko de vivoplena, senfina feliĉo kaj ne loko de antaŭkorto al nigra infero.

Kiel k-do Henri Barbusse skribis? "La milito ne estas puno de Dio, sed ĝi estas puno por via stulteco. Se vi ne volos, ne estos milito."

Ne iuj dioj faras militojn (tiam ili ja estus militkrimuloj) ĉar ili ne povas pro sia malesto. Sed ni - la homaro - reale ekzistas kaj nur ni responsas por la vivo surtera por nia propra sorto. Tial la ateismo estas tiom gravega!





## **Letero de Humanisto**, de Andrea Salamon, Izraelo

Karaj homfratoj:

Ĉiu homo havas sian hobion. La unua trinkas alkoholaĵon. La dua fumas cigaredon. La tria uzadas drogojn. La kvara kartludas. La kvina ŝakludas. La sesa ofte vizitas sportajn matĉojn. La sepa ofte vizitas preĝejon kaj fervore aŭskultas la ordonojn de la pastroj. La oka okupiĝas pri tualetoj kaj pri eleganteco. La naŭa tro multe fanfaronas pri sia patriotismo (diskutinda). La deka tro ofte montras al siaj kunuloj sian fizikan forton - kaj fizike atakas siajn homfratojn. La dekunua enfalas en diversajn teoriojn (apogitajn per sciencaj frazoj kaj esprimoj). La dekdua tro multe flegas hundojn kaj katojn. La dektria okupiĝas pri muziko. La dekkvara okupiĝas pri aliseksuloj. Kaj la dekkvina (kaj tiuj estas en la plimulto) okupiĝas pri mongajno kaj pri diligenta kolektado de havaĵo.

**Mia hobio estas humanismo**

Mi mem okupiĝas pri humanismo. En tiu nocio mi komprenas ĉiujn teoriojn:

- pri la aranĝo de homa ordo en la socio, kaj pri ilia realigo;
- pri la realigo de la plej grava kaj plej unua ordono de la Biblio - amu vian proksimulon kiel vin mem;
- pri la valoro kaj esenco de la instruoj de la granda pensuloj de la Homaro: Moseo, Sokrato, Budho, Konfuĉeo, Jesuo, Hilelo, Spinoza, Marks kaj Zamenhof;
- pri la problemoj kiuj tuŝas (eble ankaŭ turmentas) la Homaron;
- do pri ĉio kio temas la Homon kiel la plej perfektan estulon inter la vivaj estaĵoj.---kial mi faras tion?
- ĉar mia forpasinta patro tiel instruis kaj edukis min;
- ĉar dum mia longa vivo-vojo mi spertis ke tio estas la sole ebla vivo-celo kaj enhavo de mia ekzisto.

**Celoj de humanismo**

Jen mi montras al vi la celon-enhavon de tiu *ismo*:

Mi estas por homa ordo. Por homa konduto en la socio, imitu homon kaj ne beston. Se vi pravas - pruvu tion per vorto - ne per forto. La unua eco de la homo estas la pensado. Do ĉiu homo devas pensi per propra kapo. Neniun fremdan ideon li rajtas akcepti senkritike - sen propra analizo.. Latine: Cogito orgo homo sum.. Por mi estas homo ***nur tiu*** kiu povas pensi - kritiki - analizi per propra kapo. Kiu blinde akceptas fremdajn asertojn - tiu ne estas vera homo, sed papago.

Mi scias ke en la socio ĉio estas ŝanĝiĝanta kaj nenio estas perfekta (senerara). Do ni estas kontraŭ ĉiuj dogmoj kaj kontraŭ ĉiuj dogmemuloj. Ĉar ĉiu religio estas esence ligita kun dogmoj - tezoj kiujn oni ne povas kritiki nek ŝanĝi - do ni estas kontraŭ ***ĉiuj religioj***, ĉar ili estas kontraŭhomaj aperaĵoj en la socio.

**Religioj taksitaj pri la danĝero**

En la nuna socio la plej forta kaj la plej danĝera religio estas la Islamo. Unue, ĉar ĝi predikas la fizikan ekstermon de ĉiuj kiuj blinde ne obeas iliajn ordonojn. Due, ĉar iliaj gvidantoj posedas neimageblan kvanton da dolaroj kaj enorman kvanton da ŝtonoleo pere de kio ili regas la mondon. Trie, ĉar iliaj multnombraj adeptoj ankoraŭ estas je sufiĉe malalta intelekta nivelo.

La dua danĝera religio estas la kristanismo kun iliaj eklezioj. Ili ankau posedas enorman kvanton da dolaroj, kaj ankau multajn milionojn

da adeptoj. Krom tio ili havas ankaŭ dumiljaran sperton por regi la homajn amasojn.

La tria grupo: la juda religio ne estas tiel danĝera kiel la antaŭe menciitaj. Ĝiaj adeptoj estas malmultnombraj kaj ankaŭ ne tre bigotaj. La juda eklezio ne havas tiom multe da mono kiel la aliaj. Kaj ĝi ne planas konverti la aliajn al la judeco. Do ĝi estas danĝera ***nur*** por judoj. Ĉar ĝi enhavas - kiel ankaŭ la aliaj religioj - leĝojn kaj kutimojn kiuj estis kreitaj antaŭ multaj cent- aŭ miljaroj, kaj kiuj estas tute neadapteblaj por la nuna ordo en la mondo.

**Leĝoj por homaro**

Jen sekvas la leĝoj laŭ kiuj devas iri ĉiu vera ***homo***:

Ni estas por la lumo kaj kontraŭ la mallumo (superstiĉoj).

Ni estas por la progreso kaj kontraŭ la reakcio.

Ni apogas progresemulojn kaj forbatalas reakciulojn.

Ni zorgas por la morgaŭo kaj ne priploras la hieraŭon.


Ni zorgas por niaj genepoj kaj ne zorgas pri niaj geavoj (iliaj kutimoj).

Nia agado por la konstruado de pli bona kaj pli bela estonto de la homaro konsistas en senĉesa lernado, studado, analizado, esplorado de ĉiuj homaj problemoj. Ni faras tion eĉ tiam se ni estas konsciaj ke ni neniam atingos perfektecon do ni faras kaj faros erarojn.

Ni asertas ke la laboro estas la fundamenta homa valoro. Do ni helpas - apogas ĉiun laborantan homon, ĉiujn movadojn kiuj celas la plibonigon de la vivo de la laboranta homo. Ni estas kontraŭ ĉiuj parazitoj kaj kontraŭ ĉiu ideologio kiu defendas parazitismon.

Ni ne toleras ke iu homo aŭ iu homgrupo dum la sama tempo per unu gluteo rajdu sur du ĉevaloj. Tio signifas ke iu ne povas esti samtempe progresema se temas pri tekniko - kaj ankaŭ reakciulo se temas pri sociaj problemoj. Car hodiaŭ ni ne rajdas sur azeno nek ni veturas per bovoĉaro, sed per aŭtomobilo kaj aviadilo. Se mankas al ni la lumo - ni ne legas apud la meĉo sed pere de elektra kurento ni lumigas. Se ni bezonas akvon, ni ne ĉerpas ĝin ĉe la puto, sed ni malfermas la kranon de la akvokondukilo.

*La pekoj de farado*
*Amuzas multe pli ol*
*La pekoj de senfarado*



## Letero al Redaktoro, kaj Demando al Legantoj

**J.K. el Ĉeĥoslovakio skribis:** "El enketo mi eksciis, ke **nia** adresaro estas proksimume 120 personoj el 26 landoj. Interesas **min** kiom da esperantistoj estas en mia lando Ĉeĥoslovakio. Se eble, bonvolu sendi al mi iliajn adresojn, por ke mi povu kun ili kontaktiĝi, ĉar ni devas pritrakti kelkajn komunajn aferojn."

La estraro bonvenigas ĉi tiun demandon. Ni kredas ke ni eblas provizi multvaloran servon, per listo da membroj de ATEO kiu loĝas en ĉiu lando, kiun ni sendu nur al membroj en tiu lando (NE la tutan adresaron al ĉiuj membroj ĉie). Poste, la membroj en ĉiu lando eblus kontakti aliajn membrojn, per poŝto, ĉe esperantaj kunvenoj, ktp.

Ni unue pensis pri tia servo post ol membro el Hispanio skribis ke li valoras ATEO-n, parte ĉar li sentas sin tre izolata en religia lando. Estas aliaj membroj de ATEO en Hispanio; kaj ni pensis ke ni informus tutajn Hispanajn membrojn pri aliaj ateistoj.

Tamen, ni hezitas agadi en tia maniero, ĉar ni scivolas ĉu iu membro de ATEO NE volas sian nomon malkaŝi al aliaj personoj en la sama lando, ĉar tia membro timas malfavoran reakcion de registaro aŭ najbaroj, ktp. Tial....

**Bonvolu skribi al estraro, se vi NE volas havi VIAN nomon sur listo de ATEO membroj por via lando, kiu ni sendus al la aliaj membroj en la sama lando. Se la estraro NE ricevos tiajn kontraŭaĵojn, ni konsideros provizi tian servon al ĉiuj membroj. Ankaŭ, se vi aprobas kaj deziras tian servon, bonvolu skribi al estraro por ke informu nin.**

**LIBERECO DE LA MENSO,**
**KIU ESTAS LA PLEJ ESENCA LIBERO,**
**POSTULAS LIBERECON EL RELIGIO.**

## La ESTRARO de ATEO
## Ateista Tutmonda Esperantisto-Organizo

**Ralph Dumain**, Prezidanto, Ĉef-Redaktoro, kaj Kun-Fondinto
1629 Columbia Road NW, Apt. 615, Washington, DC 20009, USA
Tel: 202 - 332-0589

**Minerva Massen**, Vic-Prezidanto, Kun-Redaktoro kaj Kun-Fondinto
855 La Playa #458, San Francisco, CA 94121-3255, USA
Tel: 415 - 668-7605

**John B. Massen**, Sekratario-Kasisto kaj Eldonisto
(Vidu supre por Minerva.)

**Manuskriptoj**

Ni bezonas kaj deziras artikolojn kontribuitajn de niaj legantoj kaj abonantoj, pri diversaj temoj rilate al ateismo, religio, kaj ŝtata-eklezia interrilato en multaj landoj.

Bonvolu sendi manuskriptojn al Minerva Massen, preferinde tajpitajn kaj kun duoblaj-spacitaj linioj. Konservu ĉe vi kopion de via manuskripto.

Aŭtoroj rajtas uzi pseŭdonimojn. Ni senhezite akceptos tradukojn el klasikaj aŭtoroj kie ne ekzistas kopirajta problemo. Pri kopirajthava materialo, provu gajni permeson de la autoro aŭ eldonisto kaj sendu al ni kopion de la skribita permeso.

Ni **NE** akceptos porreligian propagandon por nia revuo.

**Korespondado kaj Informpetoj**

Vi rajtas kontakti iun ajn estraranon. Se vi anticipas ian ĝenon aŭ persekutadon pro ateisma agado, bonvolu mencii bezonatajn apartajn aranĝojn por vi. Se vi skribas permane, bonvolu skribe klare, aparte vian adreson.